

Vojaĝo inter la tempoj, dua parto
Claude Gacond, 163-a radioprelego, 1966.11.23 & 1966.11.26

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni menciis la verkon *Vojaĝo inter la tempoj* de Kalocsay, kiun ĵus eldonis Stafeto. Tiu atenta studo pri la esperanta verb-sistemo, kaj ĉefe pri la pasivaj participoj, devas esti salutata kiel grava kaj verŝajne decidiga kontribuo al la ĉesigo de lingva polemiko.

A.- Antaŭ la apero de *Vojaĝo inter la tempoj* oni ankoraŭ rajtis polemiki pri la ekzaktaj gramatikaj signifoj kaj roloj de niaj pasivaj participaj sufiksoj **ata** kaj **ita**. Nun por daŭrigi tiun debaton estos necese unue kontraŭi la sciencajn esploron de Kalocsay, kaj tio ankaŭ per scienca metodo, kaj ne plu per subjektiva teorumado.

Cl.- La apero de *Vivo kaj Lingvo* de Waringhien en 1959 jam enorme kontribuis al pli scienca orientiĝo en la debato pri **ata-ita**. Waringhien tiam atentigis la esperantistojn pri la ekzisto de tri kategorioj da verbaj radikoj. Se ekzistas verboj kiel **skribi**, **manĝi**, **konstrui**, kiuj havas **at-** kaj **it-**participojn : **skribata**, **skribita**, **manĝata**, **manĝita**, **konstruata**, **konstruita**, ankaŭ ekzistas verboj kiel **koni**, **regi**, **aŭskulti**, kiuj ĝenerale nur formas **at-**participojn : **konata**, **regata**, **aŭskultata** kaj aliaj verboj kiel **perdi**, **fini**, **trafi**, kiuj preferas la **it-**participojn : **perdita**, **finita**, **trafita**. Venontan semajnon ni ekzamenos tiun punkton, kiu fakte estas fundamenta, sed ne sufiĉe konata.

A.- Tiam Waringhien instigis la esperantistojn iom science esplori la esperantan verb-sistemon anstataŭ teorie ĝeneraligi lingvajn fenomenojn, kiuj estas ege kompleksaj. Tiun esploron entreprenis Kalocsay. Pacience li komparis esperanton kun aliaj lingvoj. Sisteme li rikoltis zamenhofajn frazojn kun pasivaj participoj.

Cl.- Kalocsay pensis nur pritrakti la demandon pri la **at-** kaj **it-**participoj. Sed tiu vojaĝo kondukis lin multe pli foren, ol li antaŭvidis. Pro tio la ĵus eldonita traktato ne nur ĉapitras pri la pasivaj participoj, sed ankaŭ pri la esperanta konjugacio plej ĝenerale.

A.- Se Teo Jung havis la kapablon malfermi polemikon pri la esperanta pasivo per sia teorio pri la participa simetrio, polemikon, kiu je iu epoko fariĝis pasia kaj akra, Kalman Kalocsay per sia *Vojaĝo inter la tempoj* alportas konkludon al tiu periodo de nia lingva historio.

Cl.- Dank'al li la jaro 1967-a ne nur signifos la okdekan jariĝon de esperanto, sed ankaŭ la eniron en novan lingvan etapon. La publiko eble tion ne tuj rimarkos. Tamen la pedagogoj devos revizii sian instruadon de la esperanta konjugacio kaj enkonduki ĉapitron pri la uzo de la participoj. Ili eble tion ne tuj faros. Sed la gramatikaj lerniloj, kiuj daŭre instruos eraran teorion baldaŭ ne plu vendiĝos pro la eldono de lernolibroj pli fidelaj al la genio de nia lingvo. Tiel la lingva unueco firmiĝos. Danĝero pri dialektiĝo malaperas.

A.- Sed la libro *Vojaĝo inter la tempoj* ne estas facile legebla. Ĝia polemika karaktero malinteresigas la legantojn, kiuj ne sufiĉe bone konas la argumentojn de Jung, Setälä, Vilborg, Stop-Bowitz, Collinson, Pumpr kaj ceteruloj. Ĝi estas redaktita ĉefe por fakuloj : esperantologoj, lingvo-profesoroj, verkistoj. Plie, manko de unueco kaj sistemeco komplikigas ĝian studadon.

Cl.- Tion bone sentis Kalocsay mem. Epiloge li skribis : « *Ĉi tiu traktato komenciĝis kiel pritrakto de la ata-ita-demando, kiel ties esploro el ĉiuj vidpunktoj. Sed montriĝis, ke la demandon oni povas elesplori nur sur larĝa bazo : oni devas difini la signifon de la verbaj finaĵoj, de la participoj. [...] Tiel do la verko pli kaj pli vastiĝis kaj fine fariĝis ekspliko de la tuta konjugacio.* »

Vojaĝo inter la tempoj, dua parto
Claude Gacond, 163-a radioprelego, 1966.11.23 & 1966.11.26

A.- Kelkaj aŭdantoj sin demandas tiam, kial Kalocsay mem rimarkante la mankojn de sia manuskripto, ĝin ne reverkis antaŭ la eldono.

Cl.- Reverko signifus reesploron de novaj detaloj. Tiu nova esploro daŭrus multajn jarojn, dum la nuna manuskripto alportis ĝeneralan solvon al debato, kiu jam sufiĉe nutris la kolonojn de nia gazetaro. Kalocsay ne povas samtempe esplori kaj instrui. Lia libro havas la karakteron de esperantologia traktato.

A.- Hodiaŭ la traktatoj de René de Saussure ne plu estas konataj de la averaĝa publiko kaj nur havas intereson por la historiistoj, esperantologoj kaj lingvo-profesoroj. Tamen en 1910 per scienca demonstro pri la vortfarado esperantlingva René de Saussure ĉesigis la tiaman polemikon pri la esperanta derivado. La ido-skismo estis naskiĝinta en 1907 grandparte de tiu polemiko.

Cl.- La malkovroj de René de Saussure, pri kiuj ni parolos foje, sufiĉe detale solvis multajn gramatikajn demandojn. Sed aŭtomate prezentigis novaj demandoj, inter ili tiu pri la ekzakta signifo de la pasivaj participoj. La publiko pensis : « *Kiam polemiko ĉesas, tuj nova polemiko ĝin anstataŭas !* » Kaj ĝi malafable rigardas al tiuj esperantologoj. Tamen estas dank'al tiuj lingvaj kaj gramatikaj debatoj, ke esperanto progresas sur la vojo al sia oficialiĝo. Tiuj diskutoj spegulas etapojn en la evoluo de la lingvo.

A.- Ni ne ankoraŭ konas la venontan lingvan demandon, kiu sin prezentos al niaj verkistoj post la solvo definitiva de la ata-ita-demando. Sed kio estas certa, tio estas, ke dank'al la scienca esplorado de Kalocsay nia lingvo denove faris grandan paŝon antauen – se lingvo povas paŝi !

Cl.- Vi certe nun atendas ekzemplojn, ĉefe se vi ne intencas legi tiun tre fakan verkon *Vojaĝo inter la tempoj*. La venontan semajnon ni ekzamenos la tri verbajn kategoriojn. Por tiu studo vi devos skribi. Do por nia venonta elsendo, antaŭ ol ŝalti vian radio-aparaton, vi bonvolu pretigi paperfolion kaj skribilon.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis Claude kaj Andrée Gacond pri la libro *Vojaĝo inter la tempoj* de Kalman Kalocsay. Ĝis reaŭdo !

-oOo-